

LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE

Kelkaj vortoj

Vi trovos en tiu ĉi bulteno koncizan protokolon pri nia Ĝenerala Kunveno. Dankon al tiuj, kiuj ĉeestis, tamen, ni kore pensis al tiuj, kiuj ne povis veni. La vizito de Esperanto-parolantaj Taĝikoj rakontiĝas en la sekvaj paĝoj. Aliajn projektojn ni pripensas kaj pri ili ni reparolos al vi. Ne forgesu subteni nin en niaj diversaj agadoj.

Pierre Jagueneau, Prezidanto

Quelques mots

Vous trouverez dans ce bulletin, un bref compte-rendu de notre Assemblée Générale. Merci à ceux qui sont venus. Nous avons aussi pensé à ceux qui n'ont pas pu se déplacer. La visite de Tadjiks espérantophones vous est contée dans les pages suivantes. D'autres projets sont à l'étude, nous vous en reparlerons. Ne manquez pas de nous soutenir dans nos différentes actions.

Pierre Jagueneau, Président

Eksterordinara rilato

Johana estis ofte en rilato kun ĉevaloj. Tio povis okazi, ĉar ŝia patro bredis, aĉetis kaj vendis ĉevalojn. Ŝi bonege rajdis, kvankam ŝi estis nur dekjara knabino, kaj ŝi konis ĉiujn vojojn ĉirkaŭ la urbo Loklo, kie la familio vivis.

Un tagon ŝia patro vokas : "Johana ! Venu ! Mi ĵus vendis la blankan virĉevalon al aĉetanto en vilaĝo Ponto. Prenu ĝin ! Rajdu al Ponto kaj liveru la ĉevalon. La aĉetanto poste reveturigos vin al Loklo." - "Sen probleme, Paĉjo, mi volonte faros tiun promenadon." Kiel kutime la patro helpis la knabinon grimpi sur la altan dorson de la ĉevalo, poste amike frapis per sia forta mano la postajon de la vigla besto, kiu tuj ekpaŝis kun Johana sur sia

dorso.

Unue Johana rajdis tra la kvietaj stratoj de la urbeto, poste la vojo migris tra kampoj, kaj tiam ŝi ekvidis la grandan arbaron, kiun ŝi baldaŭ devos trairi por atingi sian celon. Kiam ŝi atingis la limon inter la paŝtejoj kaj la arbaro, trans la strato estis fermita pordego, kiu utilas por malebligi al bovinoj eniri la arbaron. Bovinoj restu sur paŝtejo. Johana bone sciis, kion fari. Ŝi malgrimpis de la ĉevalo, malfermis la pordegon, trapasis la pordegon kun la obeema ĉevalo malantaŭ ŝi, kaj fermis la pordegon denove. Tiam la venonta paŝo estis : grimpi sur la ĉevalon denove. Sed kiel fari sen la afabla helpo de la patro ? Ŝi rigardis dekstren, maldekstren, por vidi ĉu

iu mureto aŭ trunko povus helpi al ŝi... Ŝi vidis neniun... La tereno estis tute ebena, plata. Ŝi komencis kompreni, ke ŝi ne sukcesos tion fari, kion ŝi devis fari : rajdi ĝis Ponto por liveri la ĉevalon. Ŝi sentis tristecon, mankis al ŝi kuraĝo. Apud ŝi staris la ĉevalo tute kviete. Ŝi prenis kruron de la ĉevalo, brakumis la kruron, sentis la varmecon de ĝi kaj komencis plori.

- "Kion mi faru nun ? Kiel mi povos atingi la vilaĝon, kien mi devas iri ? Ĉu mi devos tranokti ĉi tie ?"

Katastrofa etoso. Sed subite la ĉevalo ekmovis siajn krurojn, faldis siajn malantaŭajn genuojn, malaltigis sian postajon kaj... kuŝiĝis. Johana vidis tion, miregis, kaj... grimpis tute facile sur la kuŝantan beston. Kiam la ĉevalo sentis la kutiman pezon de la knabino sur sia dorso, ĝi ekstaris kaj atendis la ordonojn de sia juna mastro. Ŝi prenis la rimenojn kaj premis la ventron de la ĉevalo per siaj piedoj. Tuj la ĉevalo ekkuris gaje, kaj galopis rapide laŭ la vojeto tra la arbaro. Ne nur la ĉevalo estis gaja, same Johana ridetis dum la sekvo de la rajdado. Ili ĝustatempe atingis la vilaĝon Ponto; la aĉetanto estis kontenta, kaj kiel interkonsentite, li veturigis la knabinon al Loklo, por ke ŝi atingu sian loĝlokon kaj sian familion. Fino bona, ĉio bona.

Kiam mi rakontis tiun veran travivaĵon al iu homgrupo, infano laŭte diris : "Mankas ĉapitro en via rakonto. La aĉetanto de la ĉevalo estis tiom kortuŝita de la eksterordinara rilato inter la ĉevalo kaj la knabino, ke li tuj decidis donaci la ĉevalon al la knabino !"

Mireille Grosjean



Nia ĝenerala kunveno



Sabaton la 22-an de februaro 2014 okazis la ĝenerala kunveno de nia Esperanto-grupo, ĉe la salono "Mot à Mot", en la kvartalo Jean Vilar en Angers. Trideko da membroj venis de Angers, de la sud-okcidenta parto de nia departemento, kaj eĉ du geamikoj de najbara departemento, Loire-Atlantique.

Nia prezidanto, Pierre Jagueneau, ekformulis la programon de tiu renkonto kiam alarmilo "muĝis".

Oni devis forlasi la salonon. Estis gaja paŭzo dum kelkaj minutoj en la sunlumo, tiel malofte en la aĉa vintro. Rapide, la kunveno reprenis sian disvolviĝon: aktivado raporto 2013, projektoj 2014, bilanco, baloto kaj aprobo...

Sekvis distraĵ momentoj per:

- eta filmo pri nia partopreno al Paca Tago 2013: Pupoteatro kreita de nia Esperanto-asocio.

- lumbildaro de Frédéric Lauriol por prezenti sian teknikan ilustritan vortaron pri iloj (Eo-franca kaj franca-Eo). Ĝi estas la frukto de granda laboro de Frédéric kaj ĝojigas la Esperanto-parolantajn brikolantojn.

- fablo de Jean de La Fontaine, enscenigita kaj rearanĝita de la lernantoj dum konversacia kurso de Jeanik Marolleau; fablo



Prezentado de la fablo "Korvo kaj vulpo"



La kunveno finiĝis per gustumado de kukoj kaj trinkaĵoj

Esperantigita de Antoni Grabowski: "Korvo kaj Vulpo".

Tiu amika kunveno finiĝis post divido de tradicia reĝkuko akompanata de anĵua vino.

Ni gustumis ankaŭ bongustan veganan reĝkukon kunportitan de Vito Markov, senmodere manĝindan!

Teksto Geneviève Gourichon, fotoj Jeannine Daguin

Notre assemblée générale

Le samedi 22 février 2014 s'est déroulée l'assemblée générale de notre groupe espérantiste angevin dans la salle "Mot à mot" au centre Jean Vilar. Une trentaine de participants sont venus d'Angers, du département et même deux amis du département voisin, la Loire-Atlantique.

Notre président Pierre Jagueneau venait de présenter le programme de cette rencontre quand une alarme s'est déclenchée. La salle devait être évacuée. Il s'agissait d'un exercice de sécurité, et après quelques minutes de pause au soleil, tellement rare cet hiver, l'assemblée put reprendre: le rapport d'activités 2013, les projets pour 2014, et l'approbation du bilan financier.

Des moments distrayants ont suivi:

- Un petit film de notre participation à la Journée de la paix 2013 par un théâtre de marionnettes créé par notre groupe.

- Un diaporama de Frédéric Lauriol qui présenta son dictionnaire technique illustré espéranto-français et français-espéranto, résultat d'un travail considérable réalisé pour le bonheur des bricoleurs espérantistes.

- Une représentation de la fameuse fable "Le corbeau et le renard", de Jean de la Fontaine, mise en scène par les élèves pendant les cours de conversation de Jeanik Marolleau.

Cette rencontre amicale s'est terminée par le partage de la traditionnelle galette accompagnée de vins locaux. Nous avons aussi pu goûter un gâteau végétalien apporté par Vito Markov, préparation qui fut dégustée "sans modération"!

Texte Geneviève Gourichon, photos Jeannine Daguin

Korvo kaj vulpo

de Jean de La FONTAINE
 elfrancigis Antoni GRABOWSKI
 Aranĝo de la anĝeva klubo Januaro 2014



Sur arbo sidante, la korvo-sinjor',
 Fromaĝon en beko li tenis;
 La vulp', allogite per bona odor',
 Kun tia parolo alvenis:
"Bontagon, sinjoro nobela!
Ho kiel vi estas gracia kaj bela!
Se via voĉet', en kompar',
Ne cedas al via plumar',
Vi estas Fenikso de arboĝantoj!"

La korvo, ĝojega pro tiu admir',
 Por montri belecon de l' voĉo en kantoj,
 Malfermas la bekon: "Gak'!" falas akir',
 Kaj vulpo, kaptante ĝin, diras: "Eksciu,
 Simplulo, ke vivas flatisto ĉiu
 Je la kosto de aŭskultanta person',
 ĉi-lecion' ja valoras Fromaĝon!"
 La korvo ekĵuris en honto, konfuzo,
 Ke poste neniu lin trompos per ruzo.



Du taĝikoj vizitis nin



Verspermanĝo kun la anĝeva grupo

La Anĝeva Kulturcentro de Esperanto akceptis en marto du eksterlandanojn el Taĝikio: Svetlana kaj Firdaŭs Ŝukurov

Svetlana : historiistino, etnologino, arkeologino. Lingvoj parolataj : rusa, angla, germana, esperanta.
Firdaŭs : instruisto pri matematiko, montar-ĉiĉerono, fakulo pri turismo en grava internacia firmao. Cetere, li instruas la esperantan lingvon en mezlernejo. Lingvoj parolataj : taĝika, rusa, angla, germana, esperanta.

Kiel parto de sia turneo tra Francio, ili ĉeestis en Angers de la 19-a ĝis la 21-a de marto (inter Parizo kaj Bretonio). Post rapida vizito de kvartalo La Doutr (La Dutr') kaj paŭzeto ĉe iliaj gastigantoj, la merkreda vespero komenciĝis per manĝo en kafeterio kun membroj de nia klubo kaj geamikoj. Poste, okazis agrabla kunveno, senĝena interparolado kun niaj gastoj. La ĵaŭda mateno estis rezervita por diversaj vizitoj en Anĝevo : la kastelo, kelkaj malnovaj stratoj tra la antikva kvartalo de la urbo, la katedralo, la "Maison d'Adam", la ĉefa kaj renovigita "place du Ralliement" kaj la "Jardin du Mail". Laŭ la deziro de Svetlana kaj Firdaŭs, la lasta vizito estis dediĉita al la Esperanto-kulturdomo Greziljono (kastelo kiu situas 40 km nordoriente de Anĝevo). Dum ĉiuj vizitoj ili estis tre lertaj ; Firdaŭs surprizis nin per demandoj pri kiuj ni devis interparoli, kontroli kaj doni respondojn antaŭ lia vespera prelego.

Taĝikio

Situanta en Centra Azio, Taĝikio estas enĉirkaŭita lando, sen mar-alira, ĉirkaŭata de Ĉinio oriente, Afganio sude, Kirgizionorde, Uzbekiookcidente. Ĝi estas la plej malgranda lando de Centra Azio, ĝia surfaco valoras unu kvaronon de franca surfaco kaj tie vivas 7 500 000 loĝantoj. La montaro kovras 93% de la lando, kun pluraj altaj montpasejoj pli ol 4000 metroj (interalie en la regiono de Pamir). La kulmino nomiĝas Pinto Ismail Samani (7495 m) el la nomo de taĝika kreinto,



Tradicie vestitaj Svetlana kaj Firdaŭs



Ĉarmita publiko dum la prelego



Paŭzo kun Arlet en la "Jardin du Mail"

kun duon-aridaj pejzaĝoj. Bedaŭrinde, ofte la vojoj estas uzataj por trafiko de heroino kiu venas de Afganio. La taĝika ĉefurbo Duŝanbeo (ĉ 700 000 loĝantoj) situas ĉe la montaro. Taĝikio uzas la lingvon "taĝik" (proksima al persa lingvo) kaj la rusan. La aliaj landoj de Centra Azio uzas la turkan lingvon. La ĉefa religio estas islamo.

Kreita en 1924 sub sovetia dominado, la respubliko de Taĝikio iĝis sendependa ŝtato en 1990 post la dissplitiĝo de Sovetunio. Ĝia historio atestas pri

multaj intercivitanaj militoj ; la lasta daŭris de 1992 ĝis 1997.

La Prezidento estas elektita por 7 jaroj, per mandato unufoje revalidigebla (elektita en 1994, Emomali Rahmon, la nuna Prezidento estis, malgraŭ tio, denove reelektita en 2006... !)

Taĝikio estas la plej malriĉa lando de Centra Azio. Ĉirkaŭ unu miliono da Taĝikoj laboras eksterlande ĉefe en Rusio. Vizojn ili ne bezonas por translimiĝi al Rusio. Male, gravaj malfacilaĵoj ekzistas por iri al aliaj landoj, interalie al Uzbekio : dudeko da formularoj kompletigendaj, enketo kun ĉirkaŭ kvindek demandoj, kaj vizoj pagendaj (65 €). Tio reprezentas duonmonata salajro.

Preskaŭ ĉiam, la kamparlaboroj en valoj estas mane faritaj.

Akvo estas la natura riĉo-fonto de la lando. Gigantan hidroelektran potenco-kapablon ĝi havas, sed kiu ne tro profitas al la ne-urbaj loĝantoj ĉefe vintre (por elektra provizo, la lando dependas de Uzbekio).

Ekzistas imponaj projektoj pri konstruaĵoj de akvobaraĵoj. La baraĵo de Nurek (55 km oriente de la ĉefurbo Duŝanbeo), estas la plej alta en la mondo : 300 metrojn alta.

Produktado de aluminio kaj kultivado de kotonon estas la aliaj ĉefaj vivrimedoj.

La lando posedas sian propran valuton kiu nomiĝas "somonj".

La transport-rimedoj : de sovetia epoko, ili malmultas sed plinombrigas. Kun helpo de Ĉinoj kaj Irananoj, la Taĝikoj konstruas tunelojn kaj pontojn (ekz : la tunelo de Anzob 5 km longa, 80 km for norde de la ĉefa urbo).

Oni povus multe aldoni pri tiu lando malbone konata de ni ĉiuj !

Niaj du varmkoraj gastoj kaptis multe pli ol niajn rigardojn.

Dankegon al Svetlana kaj Firdaŭs !

Geneviève Gourichon

La visite de deux Tadjiks



Le Centre Culturel Angevin d'Espéranto a récemment accueilli un couple de visiteurs venant du Tadjikistan : Svetlana et Firdaus Shukurov.

Svetlana : historienne, ethnologue et archéologue. Elle parle le russe, l'anglais, l'allemand et l'espéranto.

Firdaus : professeur de mathématiques, guide de montagne, spécialiste du tourisme dans une grande firme internationale. Il enseigne aussi l'espéranto dans un collège. Il parle le tadjik, le russe, l'anglais, l'allemand et l'espéranto !

En tournée en France, ils ont séjourné à Angers du 19 au 21 mars.

Après une visite rapide du quartier de la Doutré et une petite pause chez leurs hôtes, la soirée de mercredi a commencé autour d'un repas en cafétéria, avec des membres du club et amis, puis s'est poursuivie par une discussion libre et très agréable avec nos invités.

La matinée du jeudi a été consacrée à la visite du château, un aperçu des vieilles rues de la cité, de la cathédrale, de la maison d'Adam, de la nouvelle place du Ralliement et enfin du jardin du Mail. Svetlana et Firdaus avaient souhaité visiter également la Maison Culturelle de l'Espéranto au château de Grésillon (à Baugé). Pendant toutes ces visites, ils se sont montrés très intéressés et Firdaus a même réussi à nous poser quelques collés pour lesquelles nous avons dû nous consulter, contrôler et apporter une réponse en soirée avant sa conférence.

Le Tadjikistan

Situé en Asie centrale, le Tadjikistan est un pays enclavé, sans accès à la mer, avec pour voisins la Chine à l'est, l'Afghanistan au sud, le Kirghizistan au nord, l'Ouzbékistan à l'ouest.

C'est le plus petit pays d'Asie Centrale, sa surface représente le quart de la France, 7 500 000 habitants y vivent. Le pays est couvert à 93% de montagnes avec de multiples cols à 4000 m d'altitude (notamment dans la région du Pamir). Le point culminant est le Pic Ismail Samani (7 495 m) du nom du fondateur du Tadjikistan, avec des paysages semi-désertiques. Malheureusement, les routes servent souvent pour le trafic d'héroïne venant d'Afghanistan.

La capitale du Tadjikistan est Douchanbé (700 000 habitants) à 706 m d'altitude, au pied des montagnes.

Les langues du pays sont le tadjik (proche du persan) et le russe alors que les autres pays d'Asie Centrale sont turcophones. La monnaie est le "somon".

La religion majoritaire est l'islam.

Créée en 1924 sous domination soviétique, la république du Tadjikistan devient indépendante en 1990 suite à l'éclatement de l'URSS. Son histoire a été marquée par de nombreuses guerres civiles, dont la dernière qui dura de 1992 à 1997.

Le président est élu pour 7 ans, avec un mandat renouvelable une seule fois (cependant le président actuel, élu en 1994, Emomali Rahmon, fut quand même réélu à nouveau en 2006 ... !)

Le Tadjikistan est le pays le plus pauvre d'Asie

Centrale. Près d'un million de Tadjiks travaillent à l'étranger, principalement en Russie ; ils n'ont pas besoin de visa pour aller en Russie. Par contre, ils rencontrent de sérieuses difficultés pour sortir, par exemple, en Ouzbékistan : une vingtaine de formulaires à remplir, une enquête d'environ cinquante questions et un coût de 65€ par visa (un demi-mois de salaire !)

Les travaux des champs dans les vallées sont réalisés la plupart du temps à la main.

L'eau est la ressource naturelle du pays. Le potentiel hydroélectrique est énorme mais ne profite pas toujours aux habitants des campagnes, surtout l'hiver (le pays dépend de l'Ouzbékistan pour son approvisionnement en électricité).

Il existe de grands projets de construction de barrages et le barrage de Nourek (à 55 km à l'est de la capitale Douchanbé) est le plus haut du monde : 300 m de hauteur.

Les autres ressources sont principalement l'aluminium et le coton.

Les réseaux routiers et ferroviaires sont peu développés et datent de l'époque soviétique. Avec l'aide des Chinois et des Iraniens, les Tadjiks construisent tunnels et ponts (ex: le tunnel d'Anzob à 80 km au nord de la capitale fait 5 km de long).

Il y aurait tant à rajouter sur ce pays, peu connu de nous tous...

Nos deux chaleureux invités ont su captiver bien plus que nos regards !

Merci à Svetlana et Firdaus.

Geneviève Gourichon



Maison Culturelle de l'Espéranto Château de Grésillon

Programo 2014 www.gresillon.org/agendo

26 aprilo - 4 majo

PRINTEMPaS, intensivaj kursoj en 3 niveloj, internaciaj KER-ekzamenoj B1-C1. Kunlabore kun ILEI.

Rete : www.gresillon.org/printempo

8-11 majo

Kantado de Interkant' kaj Muzikkomedio *La Eta Arturo*

11-17 majo

Renkonto de rememoroj inter malnovaj esp-istoj kaj iamaj gastoj de Greziljono, kun bindado kaj kantado. Tagoj de l'ekonomio, konferencoj en franca lingvo

Rete : www.gresillon.org/s1, www.gresillon.org/eco

29 junio - 6 julio

Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj. Rete : www.gresillon.org/s2

1-9 aŭgusto

Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegserio pri korea natura kuracado kaj rusa pentrarto, antaŭ SAT-kongreso.

Rete : www.gresillon.org/s3

9-17 aŭgusto

Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto. Kapriol' !

Rete : www.gresillon.org/s4

24 oktobro - 1 novembro

AUTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.



adreso

MCE, Grésillon, St. Martin d'Arce, 49150 BAUGE-EN-ANJOU, France

telefono

02.41.89.10.34

retpoŝto

kastelo@gresillon.org

"Ĉu vi ne volas Esperanton ? Vi havos la anglan, spit' al vi !"

**"Vous ne voulez pas de l'espéranto ?
Vous aurez l'anglais. Bien fait pour vos gueules!"**

Forpaso de fama verkisto, ĵurnalisto kaj humorista desegnisto : François Cavanna. Li mortis la 29-an de januaro 2014, 90 jaraĝa.

Li fondis la satiran magazinon Hara-kiri, en 1960. Aperis poste en 1969 Hara-kiri Hebdo, kiu iĝis Charlie Hebdo. Li estis fervora defendanto de respublikaj valoroj kaj de la franca lingvo. En sia verko "La belle Fille sur le tas d'ordures" (1991) (la belulino sur amaso de rubaĵoj), li estis favora al Esperanto. Fakte, li skribis "Vous ne voulez pas de l'espéranto ? Vous aurez l'anglais. Bien fait pour vos gueules !" "Ĉu vi ne volas Esperanton ? Vi havos la anglan, spit' al vi !"

Fonto : *Wikipedio*



Cavanna

Mort d'un écrivain, journaliste et dessinateur humoristique de renom : François Cavanna. Il est décédé le 29 janvier dernier, à l'âge de 90 ans.

Il fut le fondateur, en 1960, du magazine satirique Hara-Kiri puis, en 1969, du magazine Hara-kiri Hebdo qui devint Charlie Hebdo.

Il s'est positionné comme un grand défenseur des valeurs républicaines et de la langue française.

Dans son livre "La belle fille sur le tas d'ordures" (1991), Cavanna prend position en faveur de la langue espéranto : "Vous ne voulez pas de l'espéranto ? Vous aurez l'anglais. Bien fait pour vos gueules !"

Source : *Wikipédia*

Staĝo

Stage

Venonta Esperanta staĝo en SAVENAY 44 dimanĉon 22an de junio

Ĉiu povas elekti inter tri niveloj kiel kutime : veraj komencantoj, komencintoj, praktikantoj/spertuloj. La tuta programo ne ankoraŭ estas tute precizigita. Ni provos plibonigi ĝin per ne kutimaj prelegetoj aŭ similaj aferoj.

Situanta inter Nantes kaj la marbordo, Savenay posedas stacidomon, belan tendumejon, grandan lagon...
La aliĝoj jam eblas !

Prochain stage d'espéranto à SAVENAY 44 dimanche 22 juin

Chacun peut choisir comme d'habitude entre trois niveaux : vrais débutants, faux débutants, pratiquants confirmés. Le programme n'est pas encore totalement établi. Nous pourrions l'améliorer par des conférences inhabituelles ou des animations similaires.

Situé entre Nantes et la côte atlantique, Savenay possède une gare, un beau camping, un grand lac...
Les inscriptions sont ouvertes !

Informoj / Renseignements : 02 40 04 46 02

(traduction de la page 1)

Une relation extraordinaire

Johana était souvent en relation avec des chevaux. Il en était ainsi parce que son père élevait, achetait et vendait des chevaux. Elle était bonne cavalière, bien qu'elle fut une fillette de seulement dix ans, et elle connaissait tous les chemins autour de la ville de Loklo, où vivait sa famille.

Un jour son père l'appella :

- Johana ! Viens ! Je viens de vendre l'étalement blanc à un acheteur du village de Ponto. Prends-le ! Va à Ponto et livre le cheval. L'acheteur te reconduira à Loklo ensuite.

- Aucun problème, papa, je veux bien faire cette promenade.

Comme d'habitude le père aida la fillette à monter sur le dos très haut du cheval, puis amicalement frappa de sa forte main l'arrière de l'animal vigoureux qui aussitôt avança avec Johana sur son dos.

D'abord Johana chevaucha à travers les rues tranquilles de la petite ville, puis le chemin la

conduisit dans la campagne et elle aperçut alors la grande forêt qu'elle devrait bientôt traverser pour atteindre son but. Quand elle atteignit la limite entre les pâturages et la forêt, une grande barrière barrait la route, ce qui servait à empêcher les vaches de pénétrer dans la forêt. Les vaches devaient rester dans le pâturage. Johana savait bien quoi faire. Elle descendit de cheval, ouvrit la grande barrière, passa avec le cheval obéissant derrière elle, et ferma la grande barrière de nouveau. L'étape suivante était alors de remonter sur le cheval. Mais comment faire sans l'aide amicale du père ? Elle regarda à droite, à gauche pour voir si un muret ou un tronc pourrait l'aider... Elle ne vit rien... Le terrain était tout plat.

Elle commença à comprendre qu'elle ne parviendrait pas à faire ce qu'elle devait faire : aller jusqu'à Ponto pour livrer le cheval. Elle ressentit de la tristesse et le courage lui manqua. Le cheval se tenait calmement auprès d'elle. Elle prit une patte du cheval, l'enlaça, sentit sa chaleur et commença à pleurer.

- Que puis-je faire maintenant ? Comment pourrai-je atteindre le village où je dois aller ? Devrai-je passer la nuit ici ?

Atmosphère de catastrophe. Mais soudain le cheval bougea ses pattes, plia ses genoux arrière, abaissa sa croupe et... se coucha. Johana vit cela, émerveillée, et... monta très facilement sur l'animal couché. Quand le cheval sentit le poids habituel de la fillette sur son dos, il se leva et attendit les ordres de sa jeune maîtresse. Elle saisit les rênes et pressa les flancs du cheval avec ses pieds. Aussitôt le cheval se mit à courir gaiement, et galopa prestement le long du petit chemin à travers la forêt.

Le cheval n'était pas le seul à être joyeux, Johana également souriait pendant le reste de la chevauchée. Ils atteignirent juste à temps le village Ponto. L'acheteur était satisfait, et comme convenu, reconduisit la fillette à Loklo pour qu'elle retrouve sa maison et sa famille. Tout est bien qui finit bien.

Alors que je racontai cette histoire vraie à un groupe de personnes, un enfant dit à haute voix :
- Il manque un chapitre à votre histoire. L'acheteur du cheval fut tellement ému par l'extraordinaire relation entre le cheval et la fillette qu'il décida aussitôt d'offrir le cheval à la fillette !

Mireille Grosjean

Source : *Juna amiko - ILEI*

KALENDARO

Selektitaj renkontoj / staĝoj / kongresoj



1 - 12 junio

Tradicia somera aranĝo en **RUMANIO**, dum kiu oni povas malkovri diversajn regionojn de la lando, de la ĉefurbo Bukareŝto kaj Transilvanio - trapasante Karpatojn, ĝis la unika Delto de Danubo, Biosfera Rezervejo. Rete: rodica_todor@yahoo.com

6 - 11. junio

1-a Tutkelta Kongreso kaj 109-a skota kongreso - Pitlochry, **SKOTLANDO**.

Rete: skotlando@gmail.com

20 - 27. junio

24-a Internacia Kongreso de Esperanto - en Bydgoszcz, **POLLANDO**. Dum la Kongreso okazos kursoj de Esperanto kun ekzamenoj B1 kaj B2, ekskursoj al Biskupin, Toruń, Gdansk, Varsovio. Rete: info@esperanto.bydgoszcz.eu

21 - 28. junio

Bronŝtejn jubileas - en Kievo, **UKRAINIO**. En ĉefurbo de Ukrainio, omaĝo al jubileo de poeto, bardo, verkisto; longjara Esperanto-aktivilo; brila preleganto; amita, amata, amota de multaj geesperantistoj Mikaelo Bronŝtejn ! Inf.: Mikaelo Lineckij, Minske ŝose 10 - 55, Kiev-201, UA-04201, Ukrainio

21 - 28. junio

Esperanto kaj marŝado - en Chamonix, **FRANCIO**. Mens- kaj korpekzercoj. Lernado de esperanto kaj marŝado, biciklado en la belega valo de Chamonix. Rete: pascale.voldoire@lvman.net

28. junio - 4. julio

IES - Internacia Esperanto-Semajno - en Erevan, **ARMENIO**. Rete: gajane.ae@mail.ru

28. junio - 5. julio

50-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj - en Jelgava, **LATVIO**. Diversnivela Esperanto-kurso, enkonduka kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, Sankta Meso en Esperanto, Interkona, Nacia kaj Internacia Vesperoj, riĉa kultura programo, ekskursoj, kvizoj, filmoj, kantoj, dancoj. Rete: margarita.zelve@gmail.com

29. junio - 6. julio

4-a Turisma semajno - en kastelo Greziljono, Baugé, **FRANCIO**. Tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro, gvidataj de Catherine Kremer profesia ĉiĉeronino. Esperanto-kurso, kantado kaj dancado kun Jean-Luc Kristos. Rete: kastelo@gresillon.org

6 - 12 julio

10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio - en Rijeka, **KROATIO**. Rete: eeu@europa.eu

7 - 13 julio

Elfride - en Lövberget, Dala-Floda, **SVEDIO**. Restado en tradicia arbara paŝtejo, dormo sur budaj plankoj, sabate popolmuzika festo. Rete: martin.strid@gmail.com

7 - 13 julio

4-a IJL - Internacia Junulara Lingvotendaro, **HUNGARIO**. Ekster la urbo Jászberény en mirinda, verda medio. Lernado kaj amuziĝoj.

Rete: harnyos@gmail.com

12 - 20. julio

7-a SES, Somera Esperanto-Studado - La 7-a renkontiĝo de lernantoj de 'lernu.net' (sed ne nur de ili) en **SLOVAKIO** en urbo Nitra. Lernado, ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, vespere amuzado.

Rete: petro@ikso.net

12 - 20. julio

SEFT, Somera Esperanto Familia/Feria Tendaro en Thomsdorf, **GERMANIO**. Okazas tio, kion la

partoprenantoj mem aranĝas. Ni helpas unu la alian kaj ferias komune.

Inf.: René Philipp tiustulimu@web.de

13 - 19. julio

80-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) - en termalbanejo Harkány en regiono Baranya, **HUNGARIO**. Jubilee bunta programo kleriga, kultura, distra, turisma kaj profunde ripoziga. Rete: orbispictus@iol.it

13 - 20. julio

Someraj kursoj - en Lesjöfors, **SVEDIO**. Instruado je niveloj komencantoj ĝis perfektigantoj; ankaŭ infanoj.

Rete: seegarden@esperanto.se



Nous contacter

Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers

Tél. 02 41 73 17 97 - Courriel : info@esperanto-angers.fr

Vous informer

www.esperanto-angers

www.esperanto-france.org, www.esperanto-jeunes.org
 www.uea.org, www.esperanto.net